

Ignaz Franz,
 Granda Di', ni laŭdas Vin

tradukita de Hendrik Arie de Hoog

1. Granda Di', ni laŭdas Vin,
 Viajn verkojn ni honora
 Kun la mond' ni klinas nin,
 Kaj pro Via fort' Vin gloras.
 Tra l' miljaroj restas Vi
 La eterna sama Di'.

2. Antaŭ la eterna tron'
 En la gloro de l' ĉielo
 Sonas unuvoĉa ton',
 Ĉar savitoj kaj anĝeloj
 Kantas en potenca ĥor':
 "Sankta, sankta, la Sinjor'."

3. Sankta, ho, Sinjor', Regant'
 De l' ĉielaj regimentoj,
 Ĉiam estas Vi venkant'!
 Ter', ĉielo, maroj, ventoj,
 Plenas do de Via glor',
 Tial laŭdas nia kor'.

.....

4. Je honor' de l' Patro ni
 Ĉie, homo kaj infano,
 Kun la tuta Eklezi'
 Himnas pri la Dia amo.
 Kaj je l' tron' de la Savant'
 Sonas nia laŭda kant'.

5. Ho, Spirito, sankta Reĝ',
 Kiu ĉiam nin instruas,
 Kaj konsolas; ni kun preĝ'
 Antaŭ Via glor' genuas.
 Kun la Fil' kaj l' Patro Vi
 Ja eterne estas Di'.

...

*Traduko de la Germana poemo "Großer Gott, wir loben dich" de Ignaz Franz en Esperanton de HENDRIK ARIE DE HOOG (*1910 – †2001).*

Arg-1087-2192 (2014-09-01 21:10:11)

Tiu ĉi kanto-traduko troviĝas en <http://www.oocities.org/cigneto/thctxt/g/grandadin1.html> kaj en la ekumena Esperanta kantlibro "Adoru", n-ro 448. Pri la tradukinto vidu la retejojn http://eo.wikipedia.org/wiki/Hendrik_Arie_de_Hoog kaj http://www.hymnary.org/person/Hoog_HAd.